

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana

«Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue» - Paolo VI



Papo Francisko la 29-an de Majo 2022 en la soleno de la Ĉieleniro de Jesuo

Papa Francesco, il 29 maggio 2022, nelle solennità dell'Ascensione

aŭtoro: Carlo Sarandrea

Jesuo finas sian surteran vivon per reveno al la ĉiela Patro, sed antaŭe Li diras al siaj disĉiploj: “Mi sendas sur vin Tiun, kiun mia Patro promesis”, tio estas la Sankta Spirito.

Ni tiel komprenas gravan aferon: Jesuo ne forlasas siajn disĉiplojn. Li supreniras al la Ĉielo, sed Li ne lasas nin solaj. Li certigas la elverŝon de la Sankta Spirito, de lia Spirito.

Forlasante nin, Jesuo certigas, ke Li restas, trans la baroj de la tempo kaj de la spaco. Li ĉeestas ĉiam en ni, dank’ al la donaco de la Sankta Spirito, kiu igas nin liaj liberaj kaj ĝojaj atestantoj.

Ankaŭ en tio oni konstatas lian amon al ni.

Lia ĉeesto ne volas limigi nian liberecon;

Gesù conclude la sua vita terrena tornando al Padre celeste, ma prima dice ai suoi discepoli: “Mando su di voi Colui che il Padre mio ha promesso”, cioè lo Spirito Santo.

Comprendiamo allora una cosa importante: Gesù non sta abbandonando i discepoli. Ascende al Cielo, ma non ci lascia soli. Egli assicura l’effusione dello Spirito Santo, del suo Spirito.

Lasciando noi, Gesù assicura che Lui resta, oltre le barriere del tempo e dello spazio. Lui è sempre in noi, grazie al dono dello Spirito Santo, che ci fa suoi testimoni liberi e felici.

Anche in questo si vede il suo amore per noi. La sua presenza non vuole limitare la nostra

male, ĝi lasas spacon al ni ĉar la vera amo ĉiam generas proksimecon, kiu ne subpremas, kiu ne estas posedema.

Kiel sacerdoto Jesuo poste benas la disĉiplojn. Ĉi tio estas lia dua ago, sacerdota gesto, kiu parolas pri la dia amo, ĉar, en la momento de sia “eliro” al la Ĉielo, Jesuo prenas sur sin nian homecon kaj prezentas ĝin al la Patro por ĉiam propeti por ni.

Tiel, antaŭ la okuloj de la Patro, estas kaj ĉiam estos, kune kun la homeco de Jesuo, niaj vivoj, niaj esperoj, niaj vundoj.

Irante al la Ĉielo Kristo pretigas la vojon por ni, Li iras por prepari lokon por ni kaj, ekde nun, Li propetas por ni, por ke ni ĉiam estu akompanataj kaj benataj de la Patro.

Ĉio ĉi parolas al niaj vivoj kaj al ni, kaj la Papo starigis demandojn pri la atesto, kiun ni donas kiel kristanoj kaj pri nia amkapablo: ĉu ni lasas la aliajn liberaj, lasante spacon al ili? Ĉu ni preĝas por ili aŭ ĉu ni uzas ilin por niaj interesoj?

Ni lernu preĝi propete, por la esperoj kaj suferoj de la mondo, propetadi por la paco.

Kaj ni benu per niaj okuloj kaj per vortoj tiujn, kiujn ni renkontas ĉiutage!

libertà; al contrario, fa spazio a noi perché il vero amore genera sempre una vicinanza che non schiaccia, che non è possessiva.

Come sacerdote Gesù poi benedice i discepoli. Questa è la sua seconda azione, un gesto sacerdotale, che parla dell'amore divino perché, nel momento della sua salita al Cielo, Gesù prende su di sé la nostra umanità e la presenta al Padre per intercedere sempre per noi

Così, davanti agli occhi del Padre, ci sono e ci saranno sempre, con l'umanità di Gesù, le nostre vite, le nostre speranze, le nostre ferite.

Salendo al Cielo Cristo prepara la via per noi, Lui va a prepararci un posto e, fin da ora, intercede per noi, perché possiamo essere sempre accompagnati e benedetti dal Padre.

Tutto questo parla alle nostre vite e a noi e il Papa solleva una questione sulla testimonianza che noi diamo come cristiani e sulla nostra capacità di amare: lasciamo gli altri liberi, facendo loro spazio? Preghiamo per loro o li usiamo per i nostri interessi?

Impariamo a pregare, per le speranze e per le sofferenze del mondo, a intercedere per la pace.

E benediciamo con lo sguardo e con le parole chi incontriamo ogni giorno!



La
falĉrikoltado



La dek ordonoj



La fortega
vento

Pentekosto: la deveno de la Sankta Spirito

Pentecoste - La discesa dello Spirito Santo

Pentekosto estas greka vorto, kiu signifas "kvindek tagojn": fakte, oni celebras la Pentekoston kvindek tagojn post la Pasko; ĝi estas kristana festo, kiu memorigas la malsupreniron de la Sankta Spirito sur la apostolojn.

Estis la tempo de la falĉrikoltado kaj Maria kune kun la disĉiploj kaj aliaj personoj rekuniĝis en la Sankta Vespermanĝejo por memori la liveron de la dek ordonoj al Moseo. Pasis kvindek tagoj post la resurekto de Jesuo kaj subite oni aŭdis bruon, kiu similis al fortega vento: kaj supre aperis tute blanka kolombo, en lumo, kiel tiu,

Pentecoste è una parola greca che significa “cinquanta giorni”: la festa di Pentecoste si celebra infatti 50 giorni dopo la Pasqua; è una festa cristiana che commemora la discesa dello Spirito Santo sugli apostoli.

Era il tempo della mietitura e Maria insieme ai discepoli ed altre persone erano riuniti nel Cenacolo a ricordare la consegna dei dieci comandamenti a Mosè. Erano passati cinquanta giorni dalla resurrezione di Gesù e all'improvviso si udì un suono che somigliava ad un forte vento: e in alto comparve una colomba tutta bianca, in luce, come

kiu aperis dum la baptito de Jesuo.

Kaj, el la supro, aperis al ili langoj el fajro, kiuj dividiĝis kaj kusiĝis sur Maria kaj la disĉiploj. Estis la Sankta Spirito de Dio, kiun Jesuo promesis.

De tiu momento la dekdu disĉiploj, plenplenaj je la Sankta Spirito, fariĝis saĝaj kaj sanktaj kaj kapablis paroli per la lingvoj de ĉiuj popoloj, por komprenigi sin kaj instrui la Verojn de Jesuo tra la vojoj de la mondo.

Dek tagojn post la Ĉieleniro, Jesuo sendis al siaj disĉiploj la promesitan donacon: la Sankta Spirito, kiu plenigis ilin per saĝo kaj kuraĝo. La disĉiploj, vivigitaj de la donacoj de la Sankta Spirito, anoncis al la popoloj: "Jesuo, krucumita, resurektis kaj vivas!". Naskiĝis la Eklezio, la nova popolo de Dio, kiu komencis sian mision. Kion simbolas la simboloj de la Pentekosto?

La vento: la blovon de la dia vivo. Ĝi estas la Sankta Spirito promesita de Jesuo.

La kolombino: la amon de Dio kiel en la baptito de Jesuo en rivero Jordano.

La fajro: la forton kaj la kuraĝon, kiun la Sankta Spirito donas al ĉiuj.

quella apparsa al battesimo di Gesù.

E, di lassù, apparvero loro lingue come di fuoco che si dividevano e si posavano su Maria e sui discepoli. Era lo Spirito Santo di Dio che Gesù aveva promesso.

Da quel momento i dodici discepoli, pieni dello Spirito Santo, divennero sapienti e santi e seppero parlare con il linguaggio di ogni gente, per farsi capire e insegnare le Verità di Gesù per le vie del mondo.

Dieci giorni dopo essere salito in cielo, Gesù mandò ai suoi discepoli il dono promesso: lo Spirito Santo che li colmò di sapienza e di coraggio. I discepoli, vivificati dai doni dello Spirito Santo, annunciarono alle genti: "Gesù messo in croce, è risorto e vive!". Nasce la Chiesa, il nuovo popolo di Dio, che iniziò la sua missione. Cosa rappresentano i simboli della Pentecoste?

Vento: è il soffio della vita Divina. È lo Spirito Santo promesso da Gesù

Colomba: è l'amore di Dio come nel battesimo di Gesù nel fiume Giordano

Fuoco: è la forza, è il coraggio dato in dono dallo Spirito Santo.



*Jesuo
supreniris al
la ĉielo*



*Jesuo
resurektis kaj
vivas!*



La vento



La kolombino



La fajro





Tereza de Lisieux kaj Unesko

Teresa di Lisieux e l'UNESCO

aŭtorino: Tiziana Fossati
esperantigis: Mirella De Martini

150 jarojn post ŝia naskiĝo (la 2-an de Januaro 1873) kaj unu jarcenton post ŝia beatigo (la 29-an de Aprilo 1923), la Katolika Eklezio proklamis jubilean jaron por memorfesti Sanktan Terezan de la Infano Jesuo kaj de la Sankta Vizaĝo, konatan kiel Terezan el Lisieux (1873-1897).

Eĉ Unesko oficiale akceptis Terezan inter la eminentuloj, valorigitaj de ĉi tiu institucio en la jarduoj 2022-2023.

Kial Sankta Tereza de Lisieux, karmelita monaĥino mortinta pro ftizo nur 24 jarojn aĝa, estas festmemorata kiel historie rimarkinda figuro fare de Unesko?

La kialon oni eltrovas en la dokumento, sur kiu baziĝas ĉi tiu agnosko, priskribanta Sanktan Terezan kiel “Virinon de kulturo, edukado kaj paco”.

Tereza estas fakte, dum sia tempo, antaŭenigantino de la virinaj rajtoj, de egaleco kaj genra egalrajto, de inkluzivado, de la rolo de virinoj por atingi grandajn idealojn.

Ŝi estis nur 14-jara, kiam volis eniri la Karmelon; por kroni sian sonĝon ŝi petis kaj akiris permeson rekte de la Papo.

A 150 anni dalla nascita (2 gennaio 1873) e a un secolo dalla beatificazione (29 aprile 1923), la Chiesa Cattolica ha indetto un anno giubilare per commemorare santa Teresa di Gesù Bambino e del Volto Santo, conosciuta come Teresa di Lisieux (1873-1897).

Perfino l'Unesco ha accolto ufficialmente Teresa tra le personalità significative che questa istituzione valorizza nel biennio 2022-2023.

Perché santa Teresa di Lisieux, una monaca carmelitana morta di tisi a soli 24 anni, viene commemorata come figura storicamente significativa dall'UNESCO?

La motivazione va cercata nel documento, alla base di tale riconoscimento, che descrive santa Teresa come una “Donna di cultura, di educazione e di pace”.

Teresa è infatti, nel suo tempo, promotrice dei diritti delle donne, dell'uguaglianza e parità di genere, dell'inclusione, del posto delle donne nel perseguimento di grandi ideali.

Aveva solo 14 anni quando volle entrare nel Carmelo; per coronare il suo sogno chiese e ottenne il permesso direttamente al Papa.



Tereza estas “virino je klereco”, ĉar ŝi verkis “Historio de animo”, 54 poeziaĵojn, 8 teatraĵojn, 21 preĝojn kaj 266 leterojn, kiuj inspiris multajn francajn literaturistojn, artistojn kaj intelektulojn jam komence de la 20-a jarcento.

Tereza estas “edukistino”, ĉar ŝi antaŭenigas “universalajn valorojn kaj interreligian dialogon en ligo kun la homaj kaj sociaj sciencoj”. Ŝi estis instruistino de novicinoj je 22 jaroj. Ŝi spronis la novicinojn kreski al sankteco, montrante al ili la “Malgrandan vojon de la spirita infanaĝo”.

Teresa è una “donna di cultura” perché ha scritto “Storia di un'anima”, 54 poesie, 8 opere teatrali, 21 preghiere e 266 lettere, che hanno ispirato tanti letterati, artisti e intellettuali francesi già all'inizio del XX secolo.

Teresa è “un'educatrice” perché promuove “valori universali e dialogo interreligioso in legame con le Scienze umane e sociali”. Fu maestra delle novizie a 22 anni. Spronò le novizie a crescere verso la santità, indicando loro la “Piccola via dell'infanzia spirituale”.



Ŝia deziro esti en la Eklezio la amo, kiu donas kuraĝon al martiroj kaj forton al misiistoj por la anonco de la Evangelio al ĉiuj popoloj, inspiris la Eklezion proklami ŝin patronino de la Misioj, ŝin, kiu vivis en klaŭzura monaĥinejo.

Denove Unesko asertas: “Ŝia penso inspiras la socian doktrinon kaj favoras la kunvivadon por antaŭenigi integran kaj solidarecan humanismon favore al justeco kaj paco inter la popoloj”.

La influoj de la penso de Tereza, kiu volis resti nekonata al la mondo, estas ofte postmortaj.

Postmorta estas precipe ŝia agado, kiel deklaras Unesko, “por paco kaj repaciĝo danke al ŝiaj vojaĝoj”. En 1994 komenciĝis la vojaĝo de la relikvoj de Sankta Tereza, kiu atingis preskaŭ 70 landojn kaj daŭras ankoraŭ hodiaŭ, kune kun la relikvoj de ŝiaj gepatroj Louis kaj Zelig Martin, ili ankaŭ sanktuloj, en

Il suo voler essere nella Chiesa l'amore che dà il coraggio ai martiri e la forza ai missionari per l'annuncio del Vangelo a tutte le genti, ha ispirato la Chiesa a proclamarla patrona delle Missioni, lei che ha vissuto in un monastero di clausura.

Ancora l'UNESCO afferma: “Il suo pensiero ispira la dottrina sociale e favorisce il vivere insieme per promuovere un umanesimo integrale e solidale in favore della giustizia e della pace tra i popoli”.

Gli influssi del pensiero di Teresa, che voleva restare sconosciuta al mondo, sono spesso postumi.

Postuma è soprattutto la sua opera, come afferma l'UNESCO, “per la pace e la riconciliazione grazie ai suoi viaggi”. Nel 1994 iniziò il viaggio delle reliquie di santa Teresa che ha toccato quasi 70 paesi e continua ancora oggi, assieme alle reliquie dei suoi genitori Louis e Zelig Martin anch'essi santi, in

malfacilaj kuntekstoj de intercivitana militoj, kiel en Irako kaj Kolumbio.

La beatigo de Tereza okazis en 1923, sed ŝia kulto jam estis tre disvastigita. Signifa estis la atesto de pastro Adolphe Roulland (misiisto en Ĉinio, kiun Tereza subtenis per siaj preĝoj), kiu, revokita al sia patrujo, estis sendita akompani la trupojn al la fronto de la unua mondmilito. Li fakte atestis, ke la devoteco al Tereza estis disvastigita inter la soldatoj, eĉ inter tiuj en la adversa fronto.

Realigis tiel la deziro de Tereza, kiu, nun konsciante jam pri la fino de sia surtera vivo, okazinta la 30-an de Septembro 1897, skribis al Patro Adolphe Roulland: «La Sinjoro vokas min al la ĉielo, kie mi amos lin kiel mi ĉiam deziris, kaj de kie mi faros ĉion eblan, por ke Li estu amata de amaso da animoj. Tie supre mi ne estos senagema, sed mi daŭre ja laboros por la Eklezio kaj por la animoj».

La skulptisto de Tereza

Lo scultore di Teresa

aŭtorino: Tiziana Fossati

esperantigis Francesco Fagnani

La figuro de Tereza estas konata en la tuta mondo ne nur pro ŝiaj verkoj, sed ankaŭ dank' al la sennombraj artaj prezentoj pri ŝi.

La plej konata bildo de Tereza de Jesuo Infano estas la statuo de la sanktulino, kiu alpremas al si la krucon kaj la rozojn sur la brusto. Oni kalkulas, ke dum la unuaj jaroj post la sanktproklamo, okazinta en 1925, oni realigis pli ol 300.000 kopiojn de ĝi.

La aŭtoro de la statuo estis la juna religiulo kaj cistercia patro Marie-Bernard, kiu iĝis “la skulptisto de Tereza”, ĉar li realigis plurajn tipojn de statuoj de la Sanktulino.

En 1902 li eniris en seminarion, kie en

kontesti difficili di guerre civili come in Iraq e in Columbia.

La beatificazione di Teresa avvenne nel 1923, ma il suo culto era già largamente diffuso. Significativa fu la testimonianza di padre Adolphe Roulland (missionario in Cina che Teresa sostenne con le sue preghiere) che, richiamato in patria, fu inviato al seguito delle truppe sul fronte della Prima Guerra Mondiale. Egli infatti testimoniò che la devozione a Teresa era largamente diffusa tra i soldati, addirittura anche tra quelli del fronte avverso.

Si è realizzato così il desiderio di Teresa che, ormai consapevole della fine della sua vita terrena, avvenuta poi il 30 settembre 1897, scrisse a padre Adolphe Roulland: «Il Signore mi chiama al cielo, dove lo amerò come ho sempre desiderato e da dove farò il possibile per farlo amare da una moltitudine di anime. Lassù non starò in ozio, ma continuerò a lavorare per la Chiesa e per le anime».



La figura di Teresina è conosciuta nel mondo intero non solo per i suoi scritti, ma anche grazie alle numerose rappresentazioni artistiche di cui è stata oggetto.

La raffigurazione più conosciuta di Teresa di Gesù Bambino è la statua della Santa che stringe il crocifisso e le rose sul petto. Si calcola che nei primi anni dopo la canonizzazione, avvenuta nel 1925, ne siano state prodotte più di 300.000 copie.

L'autore della statua fu un giovane religioso e prete cistercense, padre Marie-Bernard, che divenne “lo scultore di Teresa”, in quanto realizzò diversi modelli di statue della Santa.

Nel 1902 entra in seminario, dove nel 1904



1904 li ricevis la libron de Tereza “Historio de animo”.

La legado kaŭzis en li la volon ami Jesuon kiel faris Tereza. En 1917 patro Marie konis patrinon Agneza de Jesuo (Paolina, fratino de Tereza) kiu volis realigi statuojn de Tereza.

De 1919 ĝis 1944, la trapista skulptisto realigis mem preskaŭ dudekon da bildoj de Tereza. Li ricevis grandan sukceson, sed ankaŭ multajn kritikojn rilate al siaj statuoj fare de iuj, kiuj tute ne ŝatis ilin. La unua statuo de sankta Tereza, kiun patro Marie-Bernard realigis, estis vokita “statuo de sankta Tereza sidanta”.

La figuro de la sanktulino estas forte influita de fotografio de la fino de la jaro 1894, kiu montras ŝin en la ĝardeno de la Karmela monaĥinejo de Lisieux, sidanta apud siaj tri fratinoj kaj patrino Maria de Gongaza. En la foto, Tereza havas la manojn kunigitaj, kun la fingroj interplektitaj, apogitaj sur la kruoj, kaj la rigardon direktitan iom flanken.

Sed patro Marie-Bernard aldonis libron metitan sur la genuoj de la Sanktulino, sub ŝiaj manoj.

Dum la jaroj 1919-1920, patro Marie-Bernard prilaboris la statuon de Tereza, kiu “spiras je amo”.

La fratino Celina faris foton tuj post la morto de Tereza. Tiu ĉi foto estis la modelo por kelkaj desegnoj faritaj de Celina mem por printi ilin sur religiaj bildetoj kaj por la statuo.

riceve il libro di Teresa “Storia di un’anima”.

La lettura suscita in lui il desiderio di amare Gesù come lo ha amato Teresa. Nel 1917 padre Marie conosce madre Agnese di Gesù (Paolina, la sorella di Teresa) che voleva far realizzare delle statue di Teresa.

Dal 1919 al 1944, lo scultore trappista realizzerà personalmente quasi una ventina di raffigurazioni di Teresa. Ebbe molto successo, ma anche molte critiche rivolte alle sue statue da certi a cui non piacevano affatto. La prima statua di santa Teresa che padre Marie-Bernard realizzò fu chiamata “statua di Teresa seduta”.

La figura della Santa è fortemente influenzata da una fotografia di fine 1894 che la ritraeva, nel giardino del Carmelo di Lisieux, seduta accanto alle sue tre sorelle e a madre Maria di Gongaza. Nella foto, Teresa ha le mani giunte, con le dita intrecciate, poggiate sulle gambe e lo sguardo rivolto un po’ a lato.

Padre Marie-Bernard, però, aggiunse un libro posto sulle ginocchia della Santa, sotto le sue mani.

Durante gli anni 1919 e 1920, padre Marie-Bernard lavorò alla statua di Teresa che “spira d’amore”.

La sorella Celina scattò una fotografia appena dopo la morte di Teresa. Questa foto fu il modello per alcuni disegni fatti da Celina stessa per stamparli su delle immaginettes e per la statua.



La verko estis metita en urnon el bronzo kaj vitro, metita siavice en nova kapelo de la preĝejo de la monaĥejo de Lisieux, konstruita specife antaŭvide al la beatproklamo de Tereza.

Sed patro Marie-Bernard decidis realigi nur la vizaĝon, la manojn kaj la piedojn, kaj la cetero de la korpo estis simple malpeza strukturo el ligno kaj fero kovrita per la vestaĵo el ŝtofo de la karmelana monaĥino.

Krome, la solvo fari el malpeza materialo la ceteron de la verko ebligis kaŝi, ene de la vestaĵo, kelkajn relikvojn de la korpo de la Sanktulino, interalie la ripojn. Kun la aldono de kruco en la maldekstra mano kaj de granda blanka floro en la dekstra mano, la statuo estis metita en la urnon nur unu monaton antaŭ la beatproklamo, okazinta dum Marto 1923 en placo Sankta Petro fare de papo Pio la 9-a.

L'opera fu posta in un'urna di bronzo e vetro, collocata a sua volta in una nuova cappella della chiesa del monastero di Lisieux costruita appositamente in vista della beatificazione di Teresa.

Padre Marie-Bernard decise però di realizzare soltanto il volto, le mani e i piedi, il resto del corpo era semplicemente una struttura leggera in legno e ferro ricoperta dall'abito in stoffa da monaca carmelitana.

La soluzione di fare in materiale leggero il resto dell'opera permetteva inoltre di nascondere, all'interno dell'abito, alcune reliquie del corpo della Santa, in particolare le costole. Con l'aggiunta di un crocifisso nella mano sinistra e un grande fiore bianco nella mano destra, la statua fu collocata nell'urna solo un mese prima della beatificazione, avvenuta nel marzo del 1923 in piazza San Pietro ad opera di papa Pio IX.



*Ho Jesuo, rigardu nin kun amo
kaj donu al ni vian dolĉan kison!
Tiel estu!*

O Gesù, riguardateci con amore
e donateci il vostro dolce bacio! Così sia!

Ĉu ĉiuj religioj egalas? Tute ne!

Religioni tutte uguali? Proprio No!

de Pastro Battista Cadei
esperantigis Mirella De Martini

Fronte al religia plurismo en nia socio, estas pluraj reagoj:

1) Malfermiteco sen kritika spirito, ignorante kunpuŝiĝon kun socio kaj ties ordosistemon.

2) Fermiteco, ignorante ke plurismo estas fakto kun kiu ni devas kunvivi.

3) Neutraleco kaj indiferenteco, kiel meza linio inter la du ekstretoj, ne konsciante, ke konkrete tio ofte neblas.

Relativismo, sinkretismo: favoraj kaj kontraŭaj motivoj.

Unua pravigo alportita de la “malfermuloj” estas ke ĉiuj religioj pli-malpli egalas: iliaj diferencoj estas malgravaj. Ĉiu religio devus rezigni kelkajn malgravajn detalojn por harmonii kun la aliaj. Por povi tion aserti, oni devus studi kaj koni almenaŭ 20 000 religiojn (kaj ili estas nur la ĉefaj). Malantaŭ ĉi tiu aserto kuŝas la ideo, ke efektive la malsamaj kredoj estas ĉiuj veraj. Tio ĉi estas relativismo.

Sed tio ne veras: se ne konfesus kristanoj, ke Jesuo estas la sola Savanto – kaj islamanoj, ke Mohamedo estas la kompleta kaj definitiva profeto, tiam ili rezignus la koron mem de ilia kredo.

Estas iuj, kiuj elektas el la heredaĵo de la grandaj religioj tion, kio ŝajnas al ili plej valida, estigante tiamaniere formojn de sinkretismo, t.e. miksado. Ofte estas proponita duobla religia aparteno: ekzemple al katolikismo kaj al alia religio. Sed tio objektive neblas. Estas kontraŭdire, ekzemple, kredi, ke nia savo pasas nur per Jesuo Kristo kaj, samtempe, kredi, ke eblas elaĉeti nin nur per niaj propraj fortoj.

Ĉu indiferentismo kiel toleremo?

La subtenantoj de la duobla aparteno kaj de

Di fronte al pluralismo religioso nella nostra società, ci sono diverse reazioni:

1) Apertura senza spirito critico, ignorando l'impatto con la società e il suo ordinamento.

2) Chiusura, ignorando che il pluralismo è un fatto con cui dobbiamo convivere.

3) Neutralità e indifferenza, come la linea di mezzo tra i due estremi, non rendendosi conto che in concreto questo è spesso impossibile.

Relativismo, sincretismo: motivi pro e contro.

Una prima motivazione portata dagli “aperturisti”, è che tutte le religioni sono più o meno uguali: le loro differenze sono secondarie. Ogni religione dovrebbe rinunciare a qualche dettaglio secondario, per armonizzarsi con le altre. Per poterlo affermare, uno dovrebbe studiare e conoscere almeno 20.000 religioni (e sono solo le principali). Dietro sta l'idea che le diverse fedi in realtà sono tutte vere. È il relativismo.

Ma questo non è vero: per i cristiani il non professare che Gesù è l'unico Salvatore; e per i musulmani che Maometto è il profeta completo e definitivo, significherebbe rinunciare al cuore stesso della propria fede.

C'è chi sceglie nel patrimonio delle grandi religioni ciò che gli appare più valido, dando così origine a forme di sincretismo, cioè mescolanza. Frequentemente vien proposta la doppia appartenenza religiosa: per esempio al cattolicesimo e a un'altra religione. Ma questo è obiettivamente impossibile. È contraddittorio, per esempio, credere che la nostra salvezza passa unicamente attraverso Gesù Cristo, e nello stesso tempo, credere che è possibile redimerci con le sole nostre forze.

Indifferentismo come tolleranza?

I sostenitori della doppia appartenenza e del

sinkretismo tion faras en la nomo de toleremo, por eviti religiajn konfliktojn. Ĉu ne plibonas esti pli malfermaj? Mi respondas per du konkretaj ekzemploj: Sankta Francisko kaj patrino Tereza de Kalkuto...

La paŝtisto de animoj devos komprenigi, ke kiu aliĝas al tia kredo, fakte tiu forlasas la kristanismon. Li estas libera tion fari, sed li ne devus aliri la sakramentojn.

sincretismo, lo fanno in nome della tolleranza, per evitare conflitti religiosi. Non è meglio essere più aperti? Rispondo con due esempi concreti: San Francesco e madre Teresa di Calcutta...

Il pastore d'anime dovrà far capire che chi aderisce a una tale fede, di fatto abbandona il cristianesimo. Egli è libero di farlo, ma non dovrebbe accostarsi ai sacramenti.



La periodaĵo: Osservatore di strada

esperantigis Francesco Fagnani

«La amaskomunikiloj, kune, estas ne nur iloj por disvastigi ideojn, sed povas kaj devas esti ankaŭ iloj je servo de mondo pli justa kaj solidara». *Benedikto la 16a en 2008*

La Osservatore di strada (Surstrata Observanto) estas periodaĵo de L'Osservatore Romano (La Roma Observanto).

La unuan numeron oni disdonis la 29an de Junio 2022 en Placo Sankta Petro, post la Anĝelusio de la Papo okaze de la festo de sanktaj Petro kaj Paŭlo.

Temas pri ĵurnalo realigita por “agnoski kaj redoni la parolrajton al tiuj, kiujn la nuntempa socio traktas kiel ‘forĵetaĵojn’”.

«I media, nel loro insieme, non sono soltanto mezzi per la diffusione delle idee, ma possono e devono essere anche strumenti al servizio di un mondo più giusto e solidale». *Benedetto XVI 2008*

L'Osservatore di strada è un periodico dell'Osservatore Romano.

Il primo numero fu distribuito il 29 giugno 2022, in piazza San Pietro, dopo l'Angelus del Papa nella festa dei santi Pietro e Paolo.

E' un giornale realizzato per “riconoscere e restituire il diritto di parola a coloro che la società contemporanea tratta come ‘scarti’”.

En la ĉefartikolo de la unua numero la direktoro de L'Osservatore Romano, Andrea Monda, difinis ĝin “ĵurnalo kiu eliras el la ĉambroj de la redakcio por iri laŭ la stratoj, kie vivas tiu, kiu havas nek tegmenton nek ion ‘por apogi la kapon’, por renkonti lin kaj provi igi lin rolulo”.

... “Ĝi ne estas ĵurnalo de la malriĉuloj nek por la malriĉuloj, sed ĉefe ĵurnalo ‘kun’ la malriĉuloj, ĉar oni realigas ĝin kune kun ili, donante la eblecon esprimi sin al tiuj, kiuj havas iun talenton por la verkado aŭ por la desegnado aŭ simple historion por rakonti aŭ opinion por esprimi. Kaj se al iu mankas la ‘iloj’, la ĵurnalo ilin provizas, kuntrenante intelektulojn kaj homojn de la kultura mondo (verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj, fotistoj, vinjetistoj, reĝisoroj, aktoroj, muzikistoj), kiuj disponigas la propran arton. Ĉiuj sur la egala nivelo. Al ĉiuj la egala digno. Por ĉiuj la egala respekto”.

Ĉiudimane en placo Sankta Petro okaze de la Anĝelusio oni disdonas la paperajn kopiojn fare de gastoj de Palaco Migliori, t.e. la domo konfidita de la Administrafako por la Karitato al la Komunumo de Sankta Eĝidio por doni tegmenton al la nehavantoj, kun la helpo de volontuloj.

La ĵurnalo havas 12 paĝojn kun tekstoj pri voluntulado, kun rakontoj, meditoj, poeziaĵoj kaj desegnoj, realigitaj de homoj helpataj de asocioj kaj de ekleziaj grupoj, aŭ de homoj simple renkontataj surstrate. Unu artikolo rakontas la sperton de aliaj “surstrataj” ĵurnaloj eldonitaj en Italio kaj en la mondo. Apartan spacon oni donas ĉiumonate al la migrantoj, kiuj povas rakonti siajn historion kaj esperojn.

Nell'editoriale del primo numero il direttore dell'Osservatore Romano Andrea Monda lo ha definito “un giornale che esce dalle stanze della redazione per andare lungo le strade, dove vive chi non ha un tetto né dove ‘posare il capo’, per incontrarlo e provare a renderlo protagonista”.

.... “Non è un giornale dei poveri e per i poveri, ma è soprattutto un giornale ‘con’ i poveri, perché realizzato insieme con loro, dando la possibilità di esprimersi a chi ha un talento per la scrittura o per il disegno o semplicemente una storia da raccontare o un'opinione da esprimere. E se a qualcuno mancano gli ‘strumenti’, è il giornale a fornirglieli, coinvolgendo intellettuali e personaggi del mondo della cultura (scrittori, poeti, giornalisti, fotografi, vignettisti, registi, attori, musicisti) che mettono a disposizione la loro arte. Tutti sullo stesso piano. A tutti la stessa dignità. Per tutti lo stesso rispetto”.

Ogni domenica in piazza San Pietro in occasione dell'Angelus, vengono distribuite le copie cartacee da alcuni ospiti di Palazzo Migliori, la struttura affidata dal Dicastero per la Carità alla Comunità di Sant'Egidio per dare un tetto a chi non ce l'ha, con l'aiuto di volontari.

Il giornale ha 12 pagine dedicate al volontariato, a racconti, riflessioni, poesie e disegni realizzati da persone assistite da associazioni e gruppi ecclesiali o semplicemente incontrate per strada. Un articolo racconta l'esperienza di altri giornali di strada pubblicati in Italia e nel mondo. Un particolare spazio viene dato ogni mese ai migranti, che potranno raccontare la loro storia e le loro speranze.



Vi transformas dezertojn en arbarojn!

esperantigis Francesco Fagnani

Dum la vizito al la manifestacio “Vilaço por la Tero”, organizita en Romo la 24an de Aprilo 2016 fare de Earth Day Italio kaj de la Fokolar-movado, Papo Francisko prononcis la jenajn vortojn:

«Aŭskultante vin paroli, venis al mia menso du bildoj: la dezerto kaj la arbaro. Mi pensis: ĉi tiuj homoj, vi ĉiuj, prenas la dezerton por transformi ĝin en arbaron. Ili iras tien, kie estas la dezerto, kie ne estas espero, kaj faras aĵojn kiuj igas arbaro tiun ĉi dezerton. [...] kaj pasi el la dezerto al la arbaro estas bela laboro, kiun vi faras. Vi transformas dezertojn en arbarojn!».

En Kenjo en la jaro 2015 papo Francisko diris: «Planti arbon estas, unue, invito al daŭre lukti kontraŭ fenomenoj kiel la senarbarigado kaj la dezertigado. Sed tio provokas nin ankaŭ por havi fidon, por esperi kaj precipe por konkrete engaĝiĝi cele al transformo de ĉiuj situacioj de maljusteco kaj de malboneco, kiujn ni suferas nuntempe».

Laŭ la spuroj de la vortoj eldiritaj de papo Francisko, diocezoj kaj katolikaj movadoj en la tuta mondo aktiviĝis por favori la zorgon pri la Kreitaro.

La misiistoj vivantaj en la teritorioj ruinigitaj de la senarbarigado evoluigis projektojn por kontraŭstari tiun ĉi fenomenon, kiu damaĝas la popolojn de ĉiuj kontinentoj. Por milionoj da homoj la arbaro signifas nutradon, laboron, pluvivon,

Durante la visita alla manifestazione “Villaggio per la Terra” organizzato a Roma il 24 aprile 2016 da Earth Day Italia e dal Movimento dei Focolari, papa Francesco pronunciò queste parole:

«Sentendovi parlare, mi sono venute alla mente due immagini: il deserto e la foresta. Ho pensato: questa gente, tutti voi, prendono il deserto per trasformarlo in foresta. Vanno dove c'è il deserto, dove non c'è speranza, e fanno cose che fanno diventare foresta questo deserto. [...] e passare dal deserto alla foresta è un bel lavoro che voi fate. Voi trasformate deserti in foreste!».

In Kenya nel 2015 papa Francesco disse:

«Piantare un albero è, in primo luogo, un invito a continuare a lottare contro fenomeni come la deforestazione e la desertificazione. Ma ci provoca anche a continuare ad avere fiducia, a sperare e soprattutto a impegnarci concretamente per trasformare tutte le situazioni di ingiustizia e di degrado che oggi soffriamo».

Sulla scia delle parole pronunciate da Papa Francesco diocesi e movimenti cattolici in tutto il mondo si sono attivati per promuovere la cura del Creato.

I missionari che vivono nei territori devastati dalla deforestazione hanno sviluppato progetti per contrastare questo fenomeno che danneggia le popolazioni di tutti i continenti. La foresta per milioni e milioni di persone vuol dire alimentazione, lavoro, sopravviven-



defendon kontraŭ inundoj kaj terfaloj.

Sed la arbaroj estas ankaŭ unuagrada fonto de kuraciloj utiligataj de granda parto de la loĝantaro.

En Ĉado frato Fabio Mussi, misiisto de Pime, planis aron da aktivaĵoj por altiri la sentemon de la loĝantaro, kaj startigis kelkajn projektojn por kontraŭstari la senarbarigadon kaj helpi la plantadon de novaj arboj.

La dezertigado en Ĉado antaŭeniras tre rapide. Je la duono de la 20a jarcento Ĉado spertis la altiĝon de la temperaturoj kaj la malaltiĝon de la precipitaĵoj.

La 90% de la Ĉada lago, la plej granda de la lando, malaperis dum la lastaj 50 jaroj pro la sekeco kaj la plialtiĝo de la elpreno de akvo por la irigaciado.

La studoj antaŭvidas, ke ĉi tiu klimato seka kaj arida pliintensigos dum la tuta 21a jarcento, tio signifante malpli grandajn agrikulturajn rendimentojn, malbonigitajn paŝtejojn kaj malfacilan ĉiutagan vivon.

Frato Fabio, kune kun kelkaj helpantoj, eltrovis la du ĉefajn kaŭzojn de la senarbarigado de la teritorio en kiu agas la misio Am Timan, en la regiono Salamat, en la sudorienta Ĉado. La unua kialo estas la uzo de ligno por kuiri; en Ĉado ne estas alternativo al la uzo de ligno.

La dua kaŭzo estas la fakto, ke la lignokomerco vivtenas multajn virinojn kaj familiojn.

Unue, oni decidis sentemigi la instruistojn pri tiu temo, por eduki la junulojn al

za, difesa da alluvioni, frane e smottamenti.

Ma le foreste sono anche una fonte primaria di medicinali usati da gran parte della popolazione.

In Ciad Fratel Fabio Mussi, missionario del Pime, ha pianificato una serie di iniziative per sensibilizzare la popolazione e avviato alcuni progetti per contrastare il disboscamento e favorire la piantumazione di nuovi alberi.

La desertificazione in Ciad sta avanzando ad un ritmo rapido. Dalla metà del 20° secolo, il Ciad ha sperimentato l'aumento delle temperature e il calo delle precipitazioni.

Il 90% del lago Ciad, il più grande del paese, è scomparso negli ultimi 50 anni a causa della siccità e dell'aumento dei prelievi d'acqua per l'irrigazione.

Gli studi prevedono che questo clima secco e arido si intensificherà per tutto il 21° secolo, il che significa minori rese agricole, pascoli degradati e una vita quotidiana difficile.

Fratel Fabio con alcuni collaboratori ha, dapprima, individuato le due principali cause della deforestazione del territorio in cui opera la missione Am Timan, nella regione del Salamat, nel Sud-est del Ciad. La prima causa è l'uso della legna per cucinare; in Ciad non c'è un'alternativa all'uso della legna.

La seconda causa è che il commercio della legna dà sostentamento a molte donne e famiglie.

Per prima cosa, si è deciso di sensibilizzare gli insegnanti su questo tema per educare i

protektado de la Kreitaro. Ĉiuj knaboj, el la elementa lernejo ĝis la supera lernejo, estis engaĝitaj en la pretigado de la tereno por planti arbojn.

Oni plantis 1000 arbojn de neem, t.e. arbo kiu kreskas rapide, bezonas malmultajn zorgojn kaj pluvivas bone en la malriĉaj terenoj. Ĉar ĝi malofte perdas siajn foliojn, ĝi provizas ombron dum la tuta jaro.

Ĉiu infano metis etikedon kun la propra nomo sur la arbo, kies kreskon oni decidis sekvi dum la tuta lerneja periodo.

En la estontenco estas planata la kreado de “produktivaj arbaroj” kie la virinoj, kunigitaj en kooperativoj, povos kultivi diversajn tipojn de arboj kaj vendi ties lignon, gajnante monon per tio.

Oni favoros la disvastigon de “plibonigitaj malmultekostaj kuirejoj” kiuj ebligas la ŝparon de ĉirkaŭ 50% de ligno kaj tempo por la kuirado de la manĝaĵoj. Tiuj ĉi “kuirejoj” estas kutime realigitaj el lado, kaj havas la avantaĝon povi esti transportataj kaj daŭri longan tempon.

Ili estas “malmultekostaj” ankaŭ ĉar la produktaj kostoj ne estas altaj.

Oni ne devas forgesi, ke en Afriko la kuirado de manĝaĵoj en malfermitaj lokoj per ligno kaj vepraro fumplenigas precipe virinojn kaj infanojn, kaŭzante gravajn efektojn sur ilia sano.

giovani a proteggere il Creato. Tutti i ragazzi dalle scuole elementari al liceo sono stati coinvolti nel preparare il terreno per piantare gli alberi.

Sono stati piantati 1000 alberi di neem, un albero che cresce rapidamente, richiede poche cure e sopravvive bene nei terreni poveri. Dato che di rado perde le foglie, fornisce ombra tutto l'anno.

Ogni bambino ha messo una targhetta con il suo nome sull'albero che si è impegnato a seguire per tutto il percorso scolastico.

In futuro è prevista la creazione di “boschi produttivi” dove le donne, riunite in cooperative, potranno coltivare diverse essenze di alberi forestali e venderne la legna ricavando un reddito.

Si promuoverà la diffusione di “cucine economiche migliorate” che permettono di risparmiare circa il 50% di legna e tempo per la cottura degli alimenti. Queste “cucine” sono generalmente realizzate in lamiera e hanno il vantaggio di poter essere trasportate e di durare a lungo.

Sono “economiche” anche perché i costi di produzione non sono elevati.

Non si deve dimenticare che in Africa la cottura al chiuso degli alimenti con legna e streglie affumica principalmente donne e bambini causando gravi conseguenze alla loro salute.



KONSEKRIĜO TRA LA MIKROFONOJ DE RADIO VATIKANA

Espero Katolika 4/1982

La 13-an de majo 1982, en la liturgia memoro pri Beata Virgulino Maria de Fatimo, la tiama Episkopo de Rimini, mons-ro Giovanni Locatelli, per la mikrofonoj de la E-elsendo de Radio Vatikana, konsekris la IKUE-movadon al la Senmakula Koro de Maria, en plena agordo kun la Papo, kiu, la saman tagon, en Fatimo (Portugaliao) konsekris al Maria la tutan homaron.

La tiama Prezidanto de IKUE, P. Duilio Magnani estis intervjuita de Radio Vatikana.

Dum la intervjuo P. Duilio Magnani klarigis la gravecon de la konsekriĝo de la asocio.

Li diris, ke, antaŭ ĉio, oni ne devis forgesi, ke la IKUE-anoj estas katolikoj antaŭ ol esperantistoj.

Do, Esperanto estas ilo, kaj tute ne la celo de la movado.

Se IKUE, laŭstatute, celis antaŭ ĉio prediki la Evangelion al ĉiu kreitaĵo, tio ne eblis nek efikis sen persona kaj, iusence, movada sankteco.

Kaj la konsekriĝo estas «speciala vojo» al sankteco.

Kiam li skribis, kelkajn tagojn antaŭe, al la Papo por informi lin pri la Konsekriĝo, pastro Magnani parolis pri ĝiaj kvar motivoj:

- unue, la gravaj kaj historiaj Aĵoj de la Virgulino en Fatimo, kun la alvoko konsekri la popolojn al ŝia Senmakula Koro.

- due, la unua datreveno de la atenco al la Sankta Patro en Placo Sankta Petro, atenco kiu estas tre ligita kun Fatimo.

- trie, spirite pilgrimi al Fatimo kun la Papo, por danki la Virgulinon pro la savo de la vivo de la Papo mem.

- kvare, la konsekriĝo al Maria okazis, pli malpli, en la dumila datreveno de la naskiĝo de la Senmakula; tial la Ikue-anoj deziris honori la Dipatrinon per ĉi tiu senkondiĉa konfido al Ŝi.



Nia Sinjorino de la Espero, ĉiela Reĝino de la Popoloj, ni estas je Viaj piedoj, kiel la Apostoloj en la Vespermanĝejo, atendante la Sanktan Spiriton por «nova» Pentekosto.

Ekde nun ni volas resti en Viaj Sanktaj manoj, kiel infanoj de la ĉiela Patro, por esti plenigitaj je la Dia Amo kaj resti ĉiam kun Vi, temploj de la Sankta Triunuo.

Ni ĝoje konsekras nin al Via Senmakula Koro, kaj konfidas al vi la tutan Esperanto-popolon, ĉar Vi estas Ekzemplo kaj Modelo por la unuopaj kristanoj kaj la tuta Eklezio.

Laŭ la Volo de Dio ni sopiras marŝi kun Vi, nia Sinjorino de la Venko, por ke estiĝu en ni kaj en la tuta homaro la Regno de Jesuo kontraŭ ĉiuspeca moderna ateismo.

Solene kaj tutkore ni promesas travivi ĉiutage, per pensoj, deziroj, agoj kaj posedaĵoj, niajn baptajn, konfirmaciajn kaj eventuale pastrajn sindevigojn, helpe de la Dia Graco, de kiu Vi estas elektita Tabernaklo kaj Perantino por la tuta Eklezio.

Al Vi ni volas aparteni korpe kaj anime, por esti konsekritaj al Jesuo, viktimoj kun Li por la gloro de la Patro kaj la savo de la pekuloj. Tial ni arde ripetis, nun kaj ĉiutage, «Tute Viaj ni estas, kaj ĉio nia estas Via». Amen!

KATOLIKA SENTO

Trimonata revuo de **Itala Katolika Esperantista Unuiĝo** fundita en 1920
Rivista trimestrale dell'**Unione Esperantista Cattolica Italiana** fondata nel 1920

KOTIZTABELO

SO	Associato ordinario solo UECI	con KS	€ 22,00
SG	Associato giovane solo UECI	con KS	€ 11,00
SF	Associato familiare solo UECI	senza KS	€ 11,00
SS	Associato sostenitore solo UECI	con KS	€ 44,00
SR	Associato religioso solo UECI	con KS	€ 0
AK	Offerta minima per KS		€ 10,00
SO + AM	Associato ordinario UECI+IKUE	con KS ed EK	€ 32,00
SG + AMJ	Associato giovane UECI+IKUE	con KS ed EK	€ 16,00
SF + MF	Associato familiare UECI+IKUE	senza KS ed EK	€ 23,50
SS + AM	Associato sostenitore UECI+IKUE	con KS ed EK	€ 52,00

La presente rivista viene inviata in modalità cartacea ai soci ordinari, giovani e sostenitori; non ai soci familiari. La rivista dell'IKUE, Espero Katolika, viene inviata tramite posta elettronica in formato PDF. Coloro che fossero interessati alla copia cartacea devono rivolgersi direttamente ad IKUE all'indirizzo internet: www.ikue.org

Per i versamenti su conto corrente postale:

n. 47127675 Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.

IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 — BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nella causale specificare:

1) Categoria dell'associato; 2) anno di nascita per i giovani; 3) esatto indirizzo per il recapito del periodico; 4) destinazione di eventuali offerte.

REDAKCIO

La residenza del presidente è sede dell'Associazione e della Redazione: Via F. Filzi, 30/A, 20851 Lissone (MB); tel. +39 039464942 – e-mail: katolika.sento@ueci.it

Direttore: Mons. Gianni Ambrosio

Collaboratori: N. Covelli, M. De Martini, F. Fagnani, C. Sarandrea, T. Fossati, C. Franchitti, G. Gazzola, M.G. Valente, E. Bottinelli

Periodico trimestrale - Reg. Trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306

Sped. in abb. post. art. 2 comma 20/c L662/96 – filiale di Vercelli

Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio

Dir. e amm.: Via F. Filzi 30^a Lissone – Stampato da: Centro Grafico Pirola

Pagina internet: <http://www.ueci.it>

Alcune immagini sono state reperite in internet e sono di proprietà dei legittimi proprietari.